HEROLDO DE ESPERANTO

Eldono: *Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstraat 3, Brussel-West.*
Redakcio-Administracio: *T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.*
Jarabono : *Belgujo 165 fk., Nederlando 9 gld. ; cetere laŭ aparta tarifo.*
Anoncetoj : *25 komencitaj vortoj b. fk. 25.—, gld. 1.25 aŭ 6 resp.-kuponoj.*
Por 26-50 vortoj duobla prezo. — Unu resp.-kupono egalvaloras 0.20 gld.

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 15 (1093) | FONDITA EN 1920 — 24-a JARKOLEKTO | 16 Oktobro 1948

La mondo denove vivas en krizoj. Brulas vundoj novaj kaj malnovaj. Berlino, Palestino, Balkano, Indonezio, Ĉinujo, Hajderabad ... Nur tri jarojn post la dua terura mondmilito oni malkaŝe parolas pri la tria. Valoraj, saĝaj homoj estas forrabitaj de ni : Eduard Beneŝ, Mohamed Ali Jinnah, Folke Bernadotte, la lasta per la mano de murdisto.

Estas bone ke en tia mondo de febroj kaj paroksismoj la viroj, kiuj decidos pri milito aŭ paco, konsciaj pri la konsekvencoj de tro rapida decido, tenas la kapon malvarma. Ni notu kun konfido ankaŭ la klopodojn de Uno, tiujn por pli intima kunlaborado de l' eŭropaj popoloj, tiujn por kreo de federacio de ĉiuj nacioj en la mondo kaj — laste-nelaste — niajn proprajn streĉadojn por doni al la homaro la komunan interkomprenilon, kiun ĝi bezonas por la atingo kaj konservo de daŭra paco. Ĝojon vekas la fakto ke, malgraŭ la nunaj necertaj cirkonstancoj, en malgranda lando kiel Nederlando la popolo povis sin dediĉi al la festado de vere malofta jubileo : tiu de la 50-jara regado de ĝia reĝino Wilhelmina kiu samtempe, pro sia aĝo, cedis la tronon al sia solfilino Juliana.

Dum ni skribas ĉi tiujn liniojn, aŭtuna ventego bruas antaŭ la fenestroj de nia redaktejo proksime de l' oceano. Minacaj nuboj pendas sub la ĉielo, sed denove kaj denove rompas al si vojon tra ili la sunradioj.

Mondcivitanoj

Hans Wilhelm Ernst, germana ĵurnalisto en Wilhelmshaven, estis antaŭ kelkaj monatoj ĝojigita per la naskiĝo de filo. Li petskribis al Trygve Lie, la ĝenerala sekretario de Uno, ke al lia filo estu oficiale donataj la titolo kaj rajtoj de *mondcivitano.* Kompreneble, la ĝenerala sekretario de Uno povis respondi al li nenion alian, ol ke li ne posedas ian juran kompetenton por konsenti tian petskribon.

Lastatempe raportis ĉiuj ĵurnaloj pri Garry Davis, 26-jara ekspiloto de la usona aerarmeo, kiu en majo oficiale rezignis sian usonan ŝtatanecon kaj ricevis de la francaj aŭtoritatoj restadpermeson ĝis la 12-a de septembro. En tiu tago li « transloĝis » sur la ŝtuparon de restoracio, ĉe la Placo de l' Trokadero, kiu apartenas al la teritorio disponigita al Uno por ĝia nunjara kunvenperiodo, kaj kiu do por la daŭro de tiu periodo estas deklarita kiel « eksteritoria ». Garry Davis pretendas ke li, kiel nuna senŝtatano, efektive estas *mondcivitano.*

« Mia celo estas mondpaco, » li deklaris, « sed novaj militoj povos esti malhelpataj nur, se la limoj malaperos kaj ĉiuj homoj sin submetos sub mondregistaron ... La mondregistaro fakte ekzistas, ĝi estas Uno, ĝi devos protekti min, kaj ĝi devos, por komenci, esti la protektanto de ĉiuj senŝtatanoj. »

La ago de Garry Davis povas ŝajni freneza ; sed principe li estas prava. Ankaŭ Hans Wilhelm Ernst principe estas prava. Sed la merito de Garry Davis estas ke li konkrete elmontris la problemon kiu okupas milionojn da homoj en la tuta mondo.

Anstataŭ armiloj

Folke Bernadotte estas murdita.

Ĉiuj, kiuj legis « La Finon », certe ricevis firman impreson pri la personeco de tiu homo. Tiun impreson fortigis dum la postaj jaroj liaj raportoj kaj paroladoj el la lokoj, kien li iris por helpi la viktimojn de la granda mizero. En la ĵus finita internacia konferenco de la Ruĝa Kruco lia voĉo arde vokis por reveki en la homaro kompaton, juston, homamon. Antaŭ nur kelkaj tagoj aperis tiu libro, kiu fariĝis lia lasta, « Anstataŭ armiloj », en kiu li rakontas pri naŭjara humaneca laboro dum la milito kaj en la mondo, kiun kreis la milito. Ĉio diris kaj diras al ni, ke li estis homo, kiu sincere kaj pelate de sia propra interno senlace laboris por mildigi suferojn kaj forigi la sekvojn de maljusta agado, por krei homajn interrilatojn de justo kaj amo.

Pro liaj klopodoj krei pacon kaj interkomprenon inter judoj kaj araboj oni nun mortigis lin. La unuaj informoj diras, ke la murdinto verŝajne estas iu ano de la Stern-ligo. Oni rajtas dubi, ĉu Bernadotte estus povinta solvi la problemon, sed pri lia sincera volo al bona kaj justa solvo neniu rajtas dubi. Homo, kiu faris tian agon, estas same mense malsana, kiel estis Hitler.

En tiu ĉi momento, kelkajn horojn post la okazo, mi ne scias, kiel reagas kaj reagos la plimulto de la judoj. Sed kiel reagos la aliaj homoj, kredeble la plimulto, tio estas preskaŭ certa.

Ni provu pensi kaj konduti ne kiel pasioregataj amashomoj sed tiel, kiel Bernadotte mem estus pensinta, se li estus sciinta sian sorton. Li ne estus kondamninta la judojn pro tio, ke tiu krimulo apartenas al ilia popolo.

La tragedio de la judoj estas granda. Se ili plejparte malaprobos la agon, trafos ilin tamen malŝato kaj malamikeco de la plimulto de aliaj homoj. Sed senfine pli granda estus la tragedio, se ili plejparte aprobus ĝin. Per tia sinteno ili dirus, ke Kain estis prava kaj Dio malprava. Mortigi senkulpajn homojn en la nomo de sia popolo, de sia lando, estas same granda krimo kiel bandite murdi homojn por rabi ilian havaĵon. Kiu ne rekonas tion, tiu neas tiun vivkoncepton, al kies kresko la judoj certe kontribuis pli ol iu alia popolo.

Se la ekstermado kaj turmentado al la judoj dum la lastaj dekkvin jaroj — kaj dum jarmiloj antaŭe — fine estus kaŭzinta ĉe ili tian mensan staton kaj tiom da malamo, ke ili ne plu vidas diferencon de justo kaj maljusto — tio estus afero, kiun oni povas kompreni. Kulpaj estas la homoj kiuj forgesas sian homan respondecon, sed pli kulpaj estas tiuj, kiuj per turmentoj igas ilin forgesi ĝin.

Kaj tamen la tragedio estas ankoraŭ pli granda. Tiu nunmomenta tragedio de homamo kaj justo kaj de la juda popolo estas malgrandskala okazo, kiu esprimas la staton de la tuta homaro. Tiu mortigo — same kiel la mortigo de Gandhi — estas al la homaro ekflamanta *Mene tekel.* Vi estas pesita kaj trovita tro malpeza. Atendas vin pereo.

Sed en la sama momento ekbrilas alia skribo : *Anstataŭ armiloj.* Ĝi montras vojon al savo. Eĉ se pereos regsistemoj, popoloj, kulturoj, tiu skribo restos kaj montros vojon al novaj generacioj, kiuj el la profundo denove klopodos al la alto.

STELLAN ENGHOLM.



La estonta sidejo de l' Unuiĝintaj Nacioj.

Eble, en ĉi tiuj tagoj, dum Uno havas sian grandan kunvenon en Parizo, oni komencos konstrui en Nov-Jorko ĝian estontan daŭran hejmon. Tiu estonta sidejo de Uno situos sur la insulo Manhattan, apud la Orienta Rivero (East River), kaj oni esperas — la tuta mondo esperas — ke ĝi, post sia pretiĝo, fariĝos vera « laborejo por la paco ». La terenon, je valoro de 8.500.000 dolaroj, donacis en 1947 s-ro John D. Rockefeller filo. La konstruado de la sidejo kostos la « bagatelan sumon » de 65 dolarmilionoj. Nia samideano *Homer R. Hansen* faris kelkajn bone sukcesintajn fotojn pri la modelo de la estonta sidejo, ĉe la informejo de la Asocio por Uno en Nov-Jorko. Unu el ili ni kliŝigis por niaj legantoj.

La modelo impresas unuavide iom strange. Kvazaŭ oni metis du alumetujojn ien sur la grundo, unu laŭlonge, la alian laŭlarĝe, kun iom da ŝtonaĵo kaj arbetaĵo inter ili. Sed oni povas supozi ke ĉi tiuj konstruaĵoj, kiam ili estos pretaj, donos maksimumon da praktika aranĝo, ke ili enhavos tre laŭcelajn kunvenejojn kaj oficejojn, kaj la « alumetujoj » ja estos fortike konstruitaj nubskrapuloj el ŝtalo kaj vitro.

Kiel unuan oni konstruos la 40-etaĝan *Sekretariejon* (la « alumetujon » maldekstre sur la bildo), kiu enhavos laborlokon por 3000 personoj, kun la ebleco pligrandigi ĝin ĝis 4400 personoj. Oni esperas pretigi ĝin ĝis 1950, samtempe kun la Konferencejo kaj, eble, ankaŭ la Halo por la Ĝenerala Kunveno.

Poste konstruotaj estas la *Halo por la Ĝenerala Kunveno* (General Assembly Hall), kiu donos imponan aspekton al la publiko venonta el la 47-a Strato kaj kiu havos 2300 sidlokojn, — kaj la *Konferencejo* (Conference Room, aŭ : Meeting Hall), malalta konstruaĵo laŭlonge de la rivero. La laste nomita enhavos tri kunvenejojn (po unu por la sekureca, ekonomia-socia kaj kuratora konsilantaroj), krome ĉambrojn por konferencoj, komitatoj, ejojn por restoracio, ripozo, ĵurnalistoj ktp. La Konferencejo estos ligita kun la Sekretariejo kaj la Halo por la Ĝenerala Kunveno. — Laste oni konstruos domegon por la *naciaj delegacioj* kaj por specialaj grupoj (la « alumetujon » dekstre).

Oni kredas ke la oficejoj estos idealaj lokoj por labori. Unu detalo : Pro tio, ke la oficistoj de Uno venas el landoj kun tiel diferenca klimato kiel Islando kaj Ekvadoro, en ĉiu oficejo aparte oni povos kontroli la temperaturon laŭdezire. Por eviti ĝenon per bruo oni enkonstruos pli ol 500.000 kvadratfutojn da son-absorba materialo.

La aranĝon de la sidejo projektis vere internacia grupo de arkitektoj kaj inĝenieroj, sub gvidado de Wallace K. Harrison. Jen iliaj nomoj : John Antoniades (Greklando), Nikolai D. Bassov (Sovetio), Vladimir Bodiansky (Francujo), Gaston Brunfaut (Belgujo), Gilmore D. Clarke (Usono), Ernest Cormier (Kanado), Josef Havlíček (Ĉeĥoslovakio), Charles Le Corbusier (Francujo), Hugh Ferris (Usono), Ssu-Cheng Liang (Ĉinujo), Sven Markelius (Svedujo), Oscar Niemeyer (Brazilo), Peter Noskov (Sovetio), Mateo Nowicki (Polujo), Howard Robinson (Britujo), Louis Skidmore (Usono), G. A. Soilleux (Aŭstralio), Julio Vilamajo (Urugvajo), Ralph Walker (Usono) kaj Ernest Weissmann (Jugoslavio).

Por kio utilas malnova tramveturilo.

Esperanto-tramo en Hago.

« En ĉiuj partoj de la mondo oni parolas Esperanton. Kial ne ankaŭ vi ? Vizitu la ekspozicion interne ! » Tiel invitis, nacilingve, grandega afiŝo kovranta la tutan flankon de malnova tramveturilo, afable disponigita senpage de la Haga Tram-Kompanio kaj eksterdeĵore kondukita de Esperanto-parolantaj tramistoj. Dum tuta semajno (13.-18 9.) la Esperanto-tramo, ornamita per verdaj flago kaj flagetoj, veturis tra la urbo kaj haltis ĉe la finstacioj de diversaj linioj por ebligi al la publiko eniri, rigardi la ekspozicion kaj ricevi, de senlace deĵorantaj samideanoj, ĉiuspecajn informojn pri nia lingvo kaj movado. La Esperanto-tramo trovis grandan intereson.

34-a U.K. Bournemouth 1949.

Apenaŭ la 33-a U.K. forpasis, jam komenciĝis la antaŭlaboroj por la 34-a. Eldoniĝis bela prospekto, formiĝis kongresa komitato, la kotizoj jam estas fiksitaj, eĉ venis jam multaj aliĝoj. Do, la starto de la 34-a estas bona kaj promesas plenan sukceson.

Loka Kongresa Komitato : Prez. J. W. Chambers, vicprez. R. Porter, ĝen. sekr. C. C. Goldsmith, konstanta sekr. O. T. Nicolaisen, komitatanoj W. Birtwistle, f-ino G. E. Cock, A. Fisher, f-ino M. Gray, s-ino W. Laurie, s-ino F. W. White.

Adreso : 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Kongresejo : La urbdomo de Bournemouth. La Malferma Kunsido kaj la Balo okazos en la Paviliono.

Dato : 6-13 aŭgusto 1949.

Kotizoj : por ordinara kongresano 30 anglaj ŝilingoj, por edzo aŭ edzino de kongresano 15 ŝil., por gejunuloj ne pli ol 20-jaraj 12 ŝil. kaj 6 pencoj. Post 31.12. 1948 la respektivaj kotizoj plialtiĝos al 35, 17/6 kaj 15 ŝil., kaj post 31.3.1949 ili estos 40, 20 kaj 20 ŝil.

Antaŭkongreso okazos en Londono. Ĝin organizos la Londona Esperanto-Klubo. Kiel sekretario de la antaŭkongresa komitato funkcias s-ano J. W. Leslie, 50 Hillfield Park, Muswell Hill, London N. 10.

Esperanto iom post iom gajnas terenon en Usono

Intervjuo kun la delegitino de UEA en San Francisko

F-ino HELENE WOLFF, delegitino de UEA en San Francisko, ankaŭ en Eŭropo bone konata, kiu post vizito al la Universala Kongreso en Malmö restis kelkan tempon en Eŭropo, bonvolis konsenti al ni la sekvantan intervjuon. Ĝi okazis en nia redaktejo en Scheveningen, en tago pluvema kaj malvarmeta, je kiaj la pasinta somero estis tiel riĉa.

*

F-ino Wolff, vi venis el suna lando Kalifornio kaj trafis en Eŭropo en someron kiu apenaŭ meritas tiun nomon. Ĉu tiu ŝanĝo ne sentigis sin malagrable al vi ?

Tute ne. Unue, San Francisko, pro sia aparta situo, estas urbo ĝenerale malvarmeta. Kaj due, kiam mi atingis la kongresurbon Malmö, tie ĝuste regis varmeg-ondo.

Ĉu la Universala Kongreso laŭ via opinio estis sukcesa ?

Certe jes. Precipe la prelegoj de la Somera Universitato staris sur alta nivelo. La Literatura Vespero ŝajnis al mi malpli sukcesinta. Speciale ĝojige estis ke en ĉi tiu kongreso ne ekzistis la « germana problemo », — la 33-a estis vere esperantista. La laborkunsidoj estis tre bone vizititaj, kaj oni laboris serioze kaj afere.

Vi vizitis ankaŭ Germanlandon. Kiun impreson faris al vi la nuntempa germana Esperanto-movado ?

Verdire, mi vizitis nur du germanajn urbojn : Kolonjon kaj Klevon, kaj tie mi spertis la veron de la vortoj, kiujn la franca samideano Prof. George diris dum la 33-a, ke en Germanujo troviĝas kelkaj el la plej idealaj esperantistoj. Oni serioze laboras en ambaŭ urboj, kaj mi konstatis ĉe la gesamideanoj grandan entuziasmon, kvankam ĝuste ĉi tiuj urboj terure suferis pro la milito.

Ĉu vi vizitis multajn nederlandajn esperantistojn ?

Ne, por tio mankis al mi la tempo. Sed partopreninte kunvenon de la Haga sekcio de LEEN, mi agrable surpriziĝis pro la multnombra vizito kaj pro la bona Esperanto-kono de la ĉeestintaro. Mi havas la impreson, ke la nederlandaj samideanoj scias alte teni la Verdan Standardon. Specialan ĝojon donis al mi la tabuloj kun la verda stelo kaj nomo de la delegito, kiujn oni renkontas en la nederlandaj stacidomoj.

Kiel statas la Esperanto-movado en Usono kaj speciale en Kalifornio ?

En Usono la homoj ĝenerale povas interkompreniĝi per la angla lingvo aŭ, pli ĝustadire, per ĝia amerika dialekto. Tial la neceso de Esperanto ne sentiĝas tiel urĝe kiel en Eŭropo. Tamen ankaŭ en Usono nia lingvo iom post iom gajnas terenon. En Kalifornio ekzistas pluraj agemaj kluboj, la plej granda en Los Angeles. Sed la laboro por nia afero estas multe pli malfacila ĉe ni ol ĉe vi en Eŭropo.

Vi nomas Usonon samlinie kun Eŭropo. Efektive, Usono estas kvazaŭ kontinento por si mem, pro sia grandeco kaj kun siaj multaj ŝtatoj diferencaj inter si laŭ situo, klimato, ekonomio ktp. Ĉu tial ne povus esti utile, krei regionajn subligojn de EANA simile al la britaj aŭ francaj federacioj aŭ la germanaj ligoj? Ni pensas, ekzemple, pri unu regiona ligo aŭ federacio por la oriento kun la urboj Nov-Jorko, Filadelfio, Vaŝingtono ktp., alia por la nordo kun Ĉikago kaj Minneapolis, tria por la sudo, kvara por la okcidento, precipe Kalifornio, kaj eble ankoraŭ pliaj. Ĉu tia subdivido ne povus pliviglig la Esperanto-vivon en la diversaj regionoj kaj, sekve, plifortigi nian movadon en Usono ? Kompreneble, tio estas nur sugesto, kaj ni konfesas ke ni estas tute nekompetentaj pri la situacio en Usono.

Fakte, kelkaj kaliforniaj esperantistoj pensis same kaj jam provis pli intime kunligi la gesamideanojn loĝantajn ĉe la pacifika marbordo, eldonante por tiu celo mimeografitan bultenon. Sed la direktantoj de EANA en Nov-Jorko opiniis malsame, timante malfortiĝon de la centro.

Ni tamen opinias ke la ideo meritas la plenan atenton kaj konsideradon de la usona esperantistaro, ĉar kredeble ankaŭ la centro des pli profitus, ju pli vigla estus la Esperanto-vivo en la diversaj regionoj.

Tio estas ankaŭ mia opinio, kaj mi esperas ke ankaŭ nia centro konvinkiĝos al ĝi.

Koran dankon, f-ino Wolff, pro la afabla intervjuo ! Ni deziras al vi agrablan hemjvojaĝon per la « Nieuw Amsterdam » al Usono kaj petas vin, transdoni niajn tutkorajn salutojn al la usona esperantistaro.

Iom pri ni mem

Forpasis somero, kiu ne estis somero — jam la kvara somero post finiĝo de la milito — en mondo, kiu tamen ne havas pacon. Sed ne pri tio ni volas paroli. Hodiaŭ ni volas babili iomete pri ni mem. Ni kredas ke ni ne tro ofte faras tion. Kiun ĝi ĝenas, tiu ne legu ĝin. Sed tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis aŭ ne plenpagis la abonkotizon, bonvolu legi almenaŭ la unuan ĉapitron sekvantan.

Nia abonantaro.

Ĝis la fino de septembro, la abonkotizon por 1948 pagis 1874 abonantoj, inter kiuj 38 dumvivaj ; 237 ankoraŭ ŝuldis je tiu dato parton (kelkaj eĉ la tuton) de la abonkotizo. Entute ni registris je la nomita dato 2111 abonantojn en 54 landoj. Krome ni *regule* liveras de ĉiu numero ĉ. 100 ekzemplerojn interŝanĝe aŭ senpage, neregule ĉ. 50 interŝanĝajn (meznombre) kaj 30-50 aŭtorajn ekzemplerojn. Tiu ĉi stato postulas eldonnombron de minimume 2400 ekzempleroj.

Estas evidente ke la malfrue-pagantoj grave malfaciligas nian administradon. Tial ankoraŭfoje ni petas ke ili *nun pagu senprokraste.*

Statistiko.

Jen laŭlanda statistiko de nia abonantaro :

Alĝerio 2, Angolo 5, Argentino 7, Aŭstralio 5, Aŭstrio 98, Belgujo 63, Belga Kongo 2, Brazilo 40, Britujo 178, Brita Norda Borneo 1, Bulgarujo 33, Ĉad-kolonio 1, Ĉeĥoslovakio 187, Ĉilio 1, Ĉinujo 2, Danlando 127, Egiptujo 3, Finnlando 32, Francujo 130, Germanujo 311, Greklando 2, Gvatemalo 1, Hindujo 2, Hispanujo 8, Hongkongo 1, Hungarujo 40, Indonezio 6, Irlando 6, Islando 20, Italujo 77, Jugoslavio 53, Kanado 5, Kanarioj 1, Kenjo 1, Kubo 1, Madejro 1, Malajujo 1, Maroko 4, Meksiko 3, Nederlando 240, Ned. Antiloj 1, Norvegujo 57, Nova Zelando 10, Palestino 6, Polujo 42, Portugalujo 15, Rumanio 3, Skotlando 16, Sovet-Unio 1, Suda Afriko 2, Svedujo 111, Svislando 49, Urugvajo 7, Usono 90. — Entute 2111.

Nia libertempo.

Verdire, ni ne povas paroli pri libertempo. Nia redaktoro intencis preni libertempon post la Germana Esperanto-Kongreso kaj, pli poste, okaze de la Sokol-festo. Sed pro tio, ke li ne ricevis vizon al München nek al Praha, tiuj planoj malsukcesis. Poste ni havis nian domon en Scheveningen plena de gastoj, esperantistaj kaj neesperantistaj. Tio estis interesa kaj distra, kaj tre plezura. Ni ankaŭ povis iom malpli-rapidigi la takton de nia laboro, kaj ni sukcesis postfari kelkajn taskojn prokrastitajn dum la trookupaj sezonoj. Sed fakte libertempo tio ne estis. Kaj nun la laboroj denove lavange almilitas nin. Precipe kreskegas denove la korespondado.

« Ni » estas nur unu homo.

Sincere parolante, ni *ĝojas* pri la ĉiama intereso de la gesamideanoj, kaj ni sentus nin malfeliĉaj, se la alvenantaj poŝtaĵoj malplimultiĝus. Sed jen nia dilemo : ni ne povas respondi ĉiun leteron aŭ poŝtkarton. Ni tre ŝatas korespondi kaj ankaŭ tre ŝatas fari komplezojn, plenumi la diversspecajn dezirojn kaj petojn, kiajn povas elpensi iu samideano. Sed se ni jam devas silente rifuzi, tio devenas de la fakto ke « ni » — unu sola homo ! — simple ne posedas la fizikan eblon, krom la redakciaj, administraj kaj multspecaj aliaj laboroj, ankoraŭ informi pri ĉiaj aferoj, eĉ tiaj kiuj ne rilatas nian entreprenon. Do, nia peto al vi : *Daŭrigu skribi al ni* pri ĉio, kio vin interesas, sed ne postulu ke ni en ĉiu kazo esprimu nian opinion, ne demandu de ni informojn aŭ kion ajn, kio postulus de ni apartan klopodon, por kiu simple mankas al ni la tempo kaj, ofte, ankaŭ la mono.

Ambaŭ — tempon kaj monon — ni certe havus, se vi helpus al ni duobligi nian abonantaron en tiuj landoj, el kiuj oni ankoraŭ povas sen grandaj malfaciloj ricevi la abonpagojn. Tiam ni povus dungi taŭgajn helpantojn, krom plioftigi aŭ pliampleksigi Heroldon, kaj nia tuta laborado fariĝus pli facila.

Ĉu vi jam sciis ke nia redaktoro estas ĉino ?

Nek ni. Sed asertis tion iu usonano al ĉina amiko kiu hazarde havas la saman nomon kiel nia redaktoro, nur iom alie skribitan. Skribis al ni s-ano Yung (Sen Yang) el Chungking : « ...mia usona amiko diris al mi, ke vi estas ĉino, mia samlandano. Kompreneble vi povas imagi, kiel ĝoja mi estas kiam mi scias, ke laboras mia samlandano en Nederlando ! Mi petas vin, multe diru al mi pri via vivo en la alia parto de la mondo, kaj kiun opinion pri Nederlando vi havas... »

Ni vere bedaŭras ke ni devis seniluziigi nian ĉinan amikon. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias, ni klarigu ke nia redaktoro estas rifuĝinto pro la Hitler-reĝimo, kies Gestapo fermis en 1936 la tiamajn presejon kaj oficejojn de Heroldo en Kolonjo, lia nomo havas la saman signifon kiel Esperanta « Juna », kaj pri Nederlando li havas ĝenerale tre bonan opinion.

Numero 13.

Ni ne apartenas al tiuj, kiuj opinias la nombron 13 speciale fatala. La unua Universala Kongreso, kiun ni vizitis, estis la 13-a en Praha, kaj ĝi enpremiĝis en nia memoro kiel unu el la plej entuziasmigaj kaj brilaj. Pli ol unu fojon ni estis en domoj aŭ cambroj, kiuj portis la numeron 13, kaj neniam trafis nin malfeliĉo. Tute male : volonte ni komencas iun aferon en la 13-a tago, ni tre ŝatas resti en societo de 13 personoj, ktp.

Tamen ŝajnas ke pri la 13-a numero de Heroldo okazis ia fatalo. Multaj abonantoj plendis ke tiu numero ne atingis ilin, precipe multaj danoj, sed ankaŭ francoj, ĉeĥoj ktp. Por tio ni scias nur unu klarigon : ke multaj samideanoj estis libertempantaj, kiam n-ro 13 alvenis en ilia loĝloko, kaj ke tial tiu numero perdiĝis.

La konsekvenco estas ke tiu numero 13 subite elĉerpiĝis. Al parto de la plendintoj ni eĉ ne povis ĝin denove ekspedi. Ankaŭ n-ro 14 estas elĉerpiĝanta. Ni do povas akcepti *novajn abonantojn* nur ekde la hodiaŭa numero. (Ili pagu por ĉi tiu lasta jarkvarono unu kvinonon de la tutjara abonkotizo.)

Respond-kuponoj.

Usona samideano sugestis en letero al ni, ke esperantistoj ne ŝanĝu ricevitajn respond-kuponojn ĉe la poŝto, sed vendu ilin al aliaj samideanoj kiuj povas utiligi ilin ; ĉar, aĉetante respond-kuponojn ĉe la poŝto, oni devas pagi altan superprezon. Nederlandaj esperantistoj povas ricevi respond-kuponojn de nia administracio en Scheveningen, po 22 cendoj (inkluzive de sendkostoj), sed ne malpli ol 10 kaj ne pli ol 20 kuponojn, kontraŭ antaŭpago per poŝtmandato aŭ per validaj nederlandaj poŝtmarkoj. (Ĝis elĉerpiĝo.)

Kia estis la 2-a Slovaka Esperanto-Kongreso ?

Post la 33-a U.K. en Malmö okazis ankaŭ la 2-a Tutslovaka Esperanto-Kongreso en *Koŝice,* sub protektorato de la komisiestro por instruado kaj lernejoj Lad. Novomestski, la 21-an kaj 22-an de aŭgusto. Partoprenis pli ol 300 delegitoj el la diversaj partoj de nia ĉeĥoslovaka respubliko, inter ili pli ol 70-jara s-ino Jozefino Mareĉkova el Kopĉany (esperantistino de 1910) kiu malgraŭ nebona sanstato vojaĝis 500 kilometrojn por veni al Koŝice.

La kongreso komenciĝis per ekspozicio bele kaj vaste aranĝita en la Ŝtata Muzeo. Poste sekvis la malfermo de la kongreso en kunvenejo « Veritas ». S-ro Rosa, prez. de SES, informis pri la stato de nia movado en Slovakujo, kiu bone kreskas ; ankaŭ pri tio, ke ne nur la komisiestro por instruado en Bratislava sed ankaŭ la ministerio por instruado kaj lernejoj en Praha helpas la Esp.-movadon, kaj ke ili ne fermas la pordon al la enkonduko de Esperanto kiel deviga lernobjekto en la lernejoj, sed ke pro la malgranda nombro de instruistoj kaj lernolibroj ĝi ankoraŭ ne estas efektivigebla. Kelkaj delegitoj kontraŭdiris ke tio ne estas malhelpo por la enkonduko de Esperanto kiel deviga fako en la lernejoj, ĉar se dum la germana okupado oni povis enkonduki la germanan lingvon kiel devigan kaj pretigi germanajn lernolibrojn, kial oni ne povus simile pretigi nun Esp.-lernolibrojn ? Tiutempe oni ankaŭ ne demandis, ĉu estas sufiĉe da instruistoj por germana lingvo. Nun — post la liberiĝo — la situacio estas simila pri la instruado de la rusa, angla, franca kaj latina lingvoj.

Vespere sekvis komuna interkonatiga vespermanĝo kun amuza kaj vasta programo kaj bona orkestro. La koroj de ĉiuj ĉeestantoj estis plenaj de ĝojo, frateco kaj amo.

La sekvintan tagon (dimanĉe) matene preskaŭ ĉiuj geesperantistoj partoprenis diservon en la katolika kaj evangelia preĝejo, kun esperantlingvaj predikoj kaj preĝaj kantoj. La neesperantistaj ĉeestantoj estis surprizitaj ke io tia estas ebla. Post la meso komenciĝis la dua kongresa tago, en kies posttagmezo okazis tielnomita « Esperanta Akademio » kiu estis tre bela.

Lunde la kongresanoj partoprenis ekskurson al la stalaktita groto de Jasova.

Aldone mi rimarku ke en la kongresaj kunvenoj kaj « Akademio » oni parolis nur esperantlingve.

aBa.

La 31-a Bulgara Esperanto-Kongreso.

En la tagoj de 21-23 aŭgusto okazis en *Jambol* la 31-a Bulgara Esperanto-Kongreso. Ĝi estis unu el la plej bone organizitaj Esperanto-kongresoj en Bulgario, pro tio oni esperas ke ĝi havos gravajn postsekvojn por la rapida disvastiĝo de nia movado en nia lando. Dum la kongresaj tagoj oni aranĝis du vesperfestojn : unu interkonatigan kaj unu artan. Al ambaŭ estis invititaj kaj ĉeestis multaj neesperantistoj, kiuj poste grandparte deklaris sian pretecon lerni Esperanton. En propaganda direkto grandan impreson faris bonege organizita Esperanto-ekspozicio, kiu montris al la larĝa publiko la progreson de nia movado kaj la proksimajn interrilatojn de la bulgaraj esperantistoj kun la eksterlandaj. La kongreson malfermis Aleksandr Blagoev, la prezidanto de la loka societo, per deca parolado post solena kanto de l' Esperanta himno de la urba ĥoro « Gusla ». La kongreson salutis reprezentanto de la ministro de popola klerigado Dr. Dramaliev, kiu promesis fari ĉion, ke en proksima estonteco Esperanto estu enkondukita en la lernejoj. La kunsidoj de la kongreso donis bonajn rezultojn. Oni ellaboris planon por la estonta agado. Samtempe oni decidis montri la kongresan ekspozicion tra la tuta lando.

A. B.

Neforgesebla feriosemajno en Norvegujo.

De la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto kolektiĝis 55 « pacaj batalantoj » el naŭ landoj en Lofthus, Hardanger (Norvegujo). Brilega fariĝis la ferio tie ! Kaj la eksterlandanoj kaj la norvegoj plene ĝuis la belan naturon kaj la esperantistan amikecon. Ni faris treege interesajn ekskursojn por vidi kiel eble plej multe de la bela regiono : al la montoj, al granda akvofalo kaj sur la fama Hardanger-fjordo. Vespere ni kunestis en la granda salono en la lernejo, ni aŭskultis interesajn paroladojn, diskutis aktuaĵajn temojn, amuziĝis kaj ludis ; jes, ni eĉ popoldancis laŭ tipe norvega popolmuziko. Ĉe la bela malnova preĝejo ni rigardis «Hardanger-geedziĝon», kie la fianĉino portas malnovan kronon, ĉiuj gastoj la nacian kostumon, kaj la ludisto venas unue, ludante per sia « Hardanger-violono ». En sunbrilo kaj varmo la tagoj rapide pasis. Kiam la disiĝo okazis, ni ĉiuj sentis malĝojon. La tagoj estis tiel belaj kaj harmoniaj.

E.M.



Ankaŭ en la Nigra Kontinento

Esperanto havas siajn propagandistojn kaj -istinojn. Unu el la plej konataj estas s-ino Irène Fink, la redaktorino de « Afrika Revuo » en Casablanca (Maroko). Sur ĉi tiu bildeto ni vidas ŝin kun ŝiaj infanoj kaj kelkaj indiĝenoj antaŭ ties kabano, en vilaĝo Khatonat en la Atlas-montaro, kie ŝi pasigis parton de sia libertempo.

Malsanulo ne povis interkompreniĝi kun kuracisto en fremda lando. Esperanto helpis.

Pasintan someron ges-roj Langerak el Rotterdamo vizitis Finnlandon kaj pasigis sian libertempon en Kuhmoinen, kiel gastoj de ges-roj Koivu, en ilia vilao sur malgranda insulo. Subite s-ro Langerak malsaniĝis, kaj oni veturigis lin al malsanulejo.

Scipovante nur sian gepatran lingvon kaj Esperanton, s-ro L. kuŝis en la malsanulejo kvazaŭ muta, ĉar nek la kuracisto nek la flegistinoj komprenis lin. Vane la kuracisto penis paroli al li en diversaj lingvoj, la paciento nenion komprenis. Tre malfacile estis kuraci malsanulon, ne povante interkompreniĝi kun li.

Foje flegistino alportis Esperanto-ŝlosilon kaj finnan-esperantan vortaron kaj komencis serĉi la necesajn vortojn. Ĝojradiante s-ro L. ekkomprenis ŝin kaj komencis konversacii kun la flegistino kaj kun la kuracisto per helpo de la nomitaj libretoj. La demandojn kaj respondojn oni skribis sur paperon. La bonega sukceso kaŭzis grandan intereson ne nur inter la kuracistoj kaj flegistinoj sed ankaŭ inter la malsanuloj ; ĉie estis aŭdeblaj diskutoj pri la « mirinda lingvo internacia Esperanto ». S-ro L. organizis Esperanto-kurson, instruante mem laŭ natura metodo, kun granda sukceso. Kiam li, resaniĝinte, forlasis la malsanulejon, liaj gelernantoj promesis daŭrigi la studadon kaj uzadon de Esperanto.

A. K., Tampere.

Esperantistino sur usona poŝtmarko

estas *Clara Barton,* fondintino de la Amerika Ruĝa Kruco. Memora poŝtmarko (de 3 cendoj) kun ŝia bildo aperis en septembro. Clara Barton, kiu organizis la zorgon pri la vunditoj en la usona civila milito kaj en la franca-prusa milito, lernis Esperanton, kiam ŝi estis jam 90-jara, konvinkite pri la neceseco kaj graveco de internacia helplingvo. Ŝi naskiĝis la 25.12. 1821 kaj mortis la 12.4.1912.

« New York — la internacia urbo »

estis la titolo de grandega murbildo en la Ora Jubilea Ekspozicio okazinta en « Grand Central Palace », Nov-Jorko, dum aŭgusto kaj septembro. Ĝi montris, ke aperas en la urbo pli ol 200 fremdlingvaj gazetoj en 31 malsamaj lingvoj, inter ili 28 ĉiutagaj ĵurnaloj. Ke Esperanto estas unu el tiuj lingvoj, vidiĝis per surgluita ekzemplero de « Amerika Esperantisto » en bone videbla loko.

Kontakto

Hallo, Kara, ĉu vi nun aŭdas min ? Ĉu bone ? Jam hieraŭ mi klopodis atingi vin, sed vane. Certe vi ne estis hejme ?

O, jes ? Nu, kontaktigo probable ne ĉiam glatas. Jes, pro la aparatoj, kompreneble ! Sed, Kara, kontaktoj inter homoj pli ofte difektiĝas.

He ? Tio ne pleje gravas ? Nu, nu ! ! Laŭ mi, tio estas la plej grava manko de l' nuntempa socio. Ĝuste por plifirmigi tiun kontakteblecon ni ja tiom obstine propagandas Esperanton. Ĉu tute erare ? Tute fuŝe ? Kontaktigo kaŭzas katastrofojn ?

Mi komprenas, pri kio vi pensas. Nuntempe internacia kontakto estiĝas preskaŭ nur per la « gvidantoj » de l' homaro. Kaj estiĝIS. Jes ! Kion TIA kontakto rezultigis, ni tute bone, korpe kaj morale, spertis dum la jaroj pasintaj. Ĝuste tiujn kontaktojn mi ne ŝatas : ili estas tro abruptaj, tro ruzaj, tro « fajraj » kaj tamen tro « malvarmaj «. Ili ŝprucas el la cerbo, ne el la koro.

Ni bezonas kontaktojn de l' koro al koro, inter HOMAJ koroj. Ŝajnas, ke tiu organo ŝrumpas, se la posedanto atingis altan ŝtupon de la socia tavolaro. Ni bezonas simplajn homojn kun simplaj sed varmaj koroj. Rekta kontakto per Esperanto inter tiaj koroj eble povos resanigi nian frenezan mondon. Kontakto, kiu diskonigos la sopiron de l' homaro al AMIKECO, AMO kaj VERO. La vivo pli valoros, se oni laboras por tiuj homecaj celoj.

La internacia Esperanto-junularo en familia rondo.

En Malmö kaj Amsterdam okazis la grandaj Esperanto-kongresoj. Ili estis grandiozaj kaj grandamase vizititaj. Preskaŭ samtempe okazis en nederlanda vilaĝo alia internacia kongreso. La loko estas tre malgranda, ankaŭ la nombro de la partoprenintoj ne estis granda, kaj eĉ multaj el la partoprenintoj estis malgrandaj. Sed malgraŭ tiu triobla malgrandeco la kunveno estis grava, eĉ tre grava. Tie kunvenis la internacia junularo. La Tutmonda Junular-Organizo (TJO) organizis sian kongresan semajnon en *Groet* — la sama loko kie antaŭ dek jaroj ĝi fondiĝis. Nur pro la fakto, ke la junularo el dek-unu landoj ĉeestis, la kunveno estis grava. La estonteco ja tute dependas de la junaj homoj. Vidante la ludantajn junulojn, oni ne rimarkis la diversajn naciecojn. Ili sentis sin *unu*. Dum ĉiuj vesperoj okazis programoj de teatraĵoj, kantado, popoldancoj ktp., ĉiuj prizorgitaj de la ĉeestantoj mem.

Dum du tagoj oni faris boatan ekskurson al Alkmaar-Volendam kaj Amsterdam. En la « oficiala » vespero la urbestro bonvenigis la kongresanojn en la nederlanda, franca kaj angla lingvoj. Tamen la prezidanto devis traduki lian paroladon, ĉar eĉ tiun multlingvulon ne povis kompreni ĉiu. El ĉiuj partoj de la mondo estis venintaj salutleteroj kaj kartoj.

Dum la laborkunsido oni decidis okazigi la venontan internacian junularkunvenon en Versailles (Francio), se eble, ne samdate kun la UEA- aŭ SAT-kongresoj. La raportoj de la diversaj funkciuloj donis bonan bildon pri la organiza vivo. Kaj oni povas konstati ke TJO estas vere vivanta movado kiu klopodas esperantistigi la junularon en la tuta mondo. Ĝi edukas la gejunulojn al konsciaj homoj, por ke ili komprenu la taskon en la movado de la plenaĝuloj.

Rememorante la tagojn en Groet, ni povas aserti ke TJO iras en bona direkto. Ĝi meritas la helpon de ĉiuj. La sekretaria adreso estas : A. Schouten, Oosteinde 122, Oosthuizen, Nederlando.

Kiu konas oficistojn de mezurkontrola servo ?

La estinta delegito de mezurkontrol-oficistoj en Ĉeĥoslovakio intencas organizi unuiĝon de tutmondaj oficistoj en mezurkontrolaj servoj. Tial li lernas diligente Esperanton, por ke li povu poste ekrilati kun eksterlandaj fakuloj-esperantistoj. Li urĝe alvokas la landdelegitojn, petante ke ili bonvolu elserĉi en sia lando almenaŭ unu teknik-oficiston de mezurkontrola servo, kiu jam scipovas Esperanton aŭ baldaŭ lernos ĝin. Krom la fondo de tutmonda centro oni projektas konstantan interŝanĝadon de fakinformoj kaj la aranĝon de internaciaj fakkongresoj. Adresojn de fakuloj bonvolu direkti al : Esperantista Klubo « D-ro Schulhof », Pardubice, Ĉeĥoslovakio.

Por geinstruistoj.

Dum la internacia junular-kunveno en Groet (Nederlando) la ĉeestintaj geinstruistoj akceptis jenan rezolucion, kiu estas subskribita de instruistoj el kvin landoj :

« La esperantistaj instruistoj, partoprenantaj en la internacia kunveno de la Tutmonda Junular-Organizo ĉe Groet, Nederlando, en fakkunsido okazinta la 9-an de aŭgusto 1948, esprimas la opinion, ke la tempo venis por organizi la esperantistajn instruistojn en ĉiuj landoj, kun la celo enkonduki Esperanton kiel devigan temon en la lernejojn de la tuta mondo .»

Por dentistoj.

La redakcio de « Tijdschrift voor Tandheelkunde », Jan Luykenstraat 52, Amsterdam-Z., senpage disponigas al dentistoj detalajn esperantistajn resumojn de artikoloj pri : 1. paradentozo, gingivohipertrofio, sangomalsano ; kazo el la praktiko ; 2. socia ortodontio ; 3. grandegĉelaj tumoroj en la makzelo ; 4. malantaŭenigo de molargrupoj (junia kajero); kaj pri: 1. la problemo de la flanka emajla listelo laŭ esploroj ĉe *Bos taurus L.* ; 2. rerespondo pri « Refoje : La fiziologia ekvilibro de la buŝkavo kaj dentkario de H. v. H. » ; 3. nova ortometro (julia kajero).

(Komunikis : Asocio de Nederlandaj Scienculoj Esperantistaj, Eekhoornlaan 10, Bennekom, Nederlando.)

NIA POŜTO.

Heroldo denove duonmonata. Post paso de la somero, Heroldo de nun denove aperos duonmonate. La venonta numero eliros la 1-an de novembro.

Kore ni dankas pro donaco de ŝil. 17/6 de s-ano L. F. Hunter en Rugby ; ni uzis la sumon por liveri Heroldon al samideanoj malhelpataj pagi.

A.G.H. en H. Se s-ano B. sendos al ni taŭgan pasportfoton, ni publikigos ĝin en iu el la sekvontaj « Galerioj ».

A.P. en K. Bedaŭrinde ni ne konas tiajn adresojn kiajn vi deziras scii.

P.B. en B. Prave vi plendas ke samideanoj sendis al vi leterojn aŭ aliajn skribaĵojn en presaĵoj, por kiuj vi devis pagi altan punafrankon. La sama ofte okazas al ni, sed kelkfoje ni malakceptis tiajn sendaĵojn pro *tro* alta punafranko. Ĝenerala averto : Oni ĉiam bone atentu la poŝtajn regulojn kaj tarifojn ! Afranku ĝuste kaj per nuntempe validaj poŝtmarkoj !

A.Gr. en L.B. Ni skribis por vi al s-ro G., petante lin sendi al vi ekzempleron de la represaĵo.

K.P. en H. Vidu la proponon de G.L. pri « Amikaj kluboj por Germanujo » en la hodiaŭa numero (« Libera Tribuno »).

EKZAMENU VIN MEM !

Respondoj al la demandoj en la pasinta numero.

61. En 1929 ; tiam eldonis « Paramount Famous Lasky Corporation » en New York triminutan sonfilmon en Esperanto, kun H. W. Hetzel kaj s-ino Chomette.
62. 44 ; 308 ; 1266 ; 1455.
63. a) apostolo (a post olo) ; b) du apostoloj (du a post oloj) ; c) interpretisto (inter pr-et isto).
64. Kelktempa ĉeso ne estas forgeso. (Proverbaro 850,4.)
65. Fiero ; teleroj kaj diskoj ; serpenton.

Novaj demandoj kaj taskoj.

66. Kiun naciecon havas (aŭ havis) la jenaj konataj esperantistoj : a) Saldanha Carreira, b) E. Wiesenfeld, c) M. E. Carolfi, d) William S. Benson ?
67. a) Kiu verkis kaj b) kiu tradukis la libron « Eŭropo ĉe la abismo » ?
68. El kvin respondoj elektu la ĝustan : Kiu (aŭ kio) estas (aŭ estis) *Magot ?* a) Franca generalo dum la unua mondmilito ; b) simio vivanta en Nordafriko kaj Gibraltaro ; c) rivereto en la usona ŝtato Luiziano ; d) hindoĉina ludo per bambu-bastonetoj (origine : Mah-Ghot) ; e) fraŭlina nomo de la edzino de King C. Gillette, eltrovinto de la razaparato.
69. Ŝercdemando : Kie eĉ la plej granda krimulo, ekz. murdisto, ankoraŭ povas trovi simpation ?
70. Difinoj el Plena Vortaro (la tasko estas, anstataŭigi la x per la ĝustaj literoj) :
    a) Jxxxxxo : Arbeto el familio oleacoj, kun bonodoraj floroj.
    b) kxxxxxi : Senpere scikoni sian propran sentadon aŭ penson.

Tutmonda Asocio Socikredita

fondiĝis la 28.8. en Londono. Ĝi estas nepolitika, kultura asocio, kiu celas : disvastigi socikrediton per Esperanto kaj disvastigi Esperanton inter la socikreditanaro. Prezidanto estas W. Townend, B.A., B.Sc. (Econ.), M.R.S.T. ; hon. ĝen. sekretario J. W. Leslie (50 Hillfield Park, Muswell Hill, London N. 10) ; hon. kasisto F. C. Rudman. Tiuj oficantoj estas provizoraj ĝis la Universala Kongreso de Bournemouth.

Sola oficiala lingvo de TASK estas Esperanto, kaj en TASK oni estas Taskanoj, ne nacianoj. Jarkotizo estas egalvaloro de 2 ŝil. 6 pencoj. El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon, 5 resp.-kuponoj. Interesuloj el la tuta mondo skribu al la sekretario.

Karolo Piĉ :

SENVIVAJ AMIKOJ

Kiu nenion tenas kaj posedas,
kiu nenion povas nomi sia,
kiu sen intereso ekoscedas
sub sia malĝojego apatia,

kiu neniun karulinon havas,
tiu almenaŭ per senvivaj iloj
sin ĉirkaŭigas, kiam pluvoj lavas
liajn fenestrojn plore dum apriloj ...

La iloj estas : ora fontoplumo,
horloĝo kiu lin matene vekas,
krajonoj, libroj, kara amvolumo,
tio aŭ tio (oni ankaŭ pekas) ...

Kaj tiam li do ekkonstatas mire,
ke al la homo povas ne nur homoj
kiel amikoj servi, sed verdire
eĉ aĵoj, plumoj, libroj, metronomoj ...

Ni kore kondolas.

Pri la forpaso de kelkaj samideanoj ni ricevis ampleksajn nekrologojn, kiujn ni bedaŭrinde povas nur ekstrakte publikigi, pro manko de loko.

En Germanujo mortis, sekve de kolizio kun motorciklo, nia samideanino s-ino *Martha Brauns-Forel,* filino de la iama fama svisa sciencisto Prof. Auguste Forel. Ŝia edzo D-ro Arthur Brauns trovis la morton en la Ĝeneva lago, akcidentinte dum boatveturo, en 1925. La familioj Brauns-Forel estis ankaŭ fervoraj adeptoj de la Bahareligio. Ankaŭ en Germanujo forpasis konata estona samideano, Cseh-instruisto *Elmar Kauer,* en la frua mateno de sia 44-a naskiĝtago, la 12.8.1948, kiel ekzilulo. Tuj post la kapitulaco de Germanujo li komencis gvidi Esp.-kursojn en Miltenberg, pli poste en Aschaffenburg. Pro liaj meritoj, la Esp.-grupo de Aschaffenburg decidis akcepti lian antaŭnomon kaj nomi sin : Esperanto-Grupo « Elmaro ».

Dum la lastaj monatoj forpasis la jenaj anglaj gesamideanoj : *V. Grimmit,* 80-jara, en Herne Bay ; *Ch. R. Grugeon,* 59-jara, en Henley-on-Thames ; s-ino *M. T. Guéritte,* 66-jara, en Surbiton ; *C. A. P. Leverton,* 73-jara, en Nottingham ; *C. V. Mackenzie,* 59-jara, en Halesowen ; kaj *John Muir,* prez. de la Esp.-grupo de Dundee.

La kongresanoj en Malmö estis trafitaj de la morto de f-ino *Hilda Hansson,* agema membro de la Klubo Esperantista de Malmö, kiu forpasis la 2.8. post mallonga malsano.

Pola esperantisto *Boleslaw Dylewski* mortis la 5.6. en Upsala, Svedujo, 34-jara.

La 10.8. ĉesis la vivo de s-ano *Th. Schneider* en St. Gallen (Svis.), hon. membro de Svisa Esp.-Societo ; de dudek jaroj li presigis la revuon « Svisa Espero ».

Lastmomente ni eksciis pri la subita morto de *Prof. D-ro Edwin L. Clarke,* prezidanto de EANA. (Detaloj venontnumere.)

Parolas la leganto (Libera Tribuno).

LOLO EN NIA SULKO.

Kelkajn vortojn mi volas diri pri malagrabla simptomo, kiun lastatempe mi rimarkis en la Esperanto-gazetoj, kiujn mi legas, kaj eĉ en Heroldo : En la angulo por la anoncetoj, miksitaj inter la ordinaraj kaj simpatiaj petoj pri korespondado (vivoplena fluo de vera popolo kaj utila fako de vigla movado), enŝoviĝas de tempo al tempo aliaj strangaj anoncetoj kun peto korespondi *nur* en angla lingvo, *nur* en franca lingvo aŭ *nur* en kiu ajn alia nacia lingvo.

Estas evidente, ke temas pri personoj tute fremdaj al nia afero (se ne malfavoraj aŭ rikanemaj al ĝi), kiuj tamen volas profiti el la mirinda kaj vasta reto da esperantistoj tra la mondo.

Eĉ plej fervora esperantisto agnoskas sincere, ke nia movado ankoraŭ estas modesta kaj humila infano, kompare kun la kolosoj de kelkaj naciaj lingvoj ; sed, ankaŭ same, eĉ plej juna komencanto scias praktike pri la avantaĝoj de Esperanto super ĉiuj ĉi kolosoj por povi, tute facile kaj senpene, interrilatiĝi ĉie ajn en la mondo. kvazaŭ en provinco de unu sola lando. Tial estas ja la esperantistoj, kiuj rajtas fieri kaj ridi kaj ... bari sian pordon al tiuj uzantoj aŭ fuŝantoj de arogantaj naciaj lingvoj, kiuj ŝtelire enŝoviĝas en la paĝojn de nia gazetaro por korespondi en lingvoj fremdaj al ni, profitante el tiu spontanea kaj densa organizo, kiun rekte kaj vigle kreas nia popolo per leteroj aŭ poŝtkartoj en ĉiulandaj urboj kaj vilaĝoj.

Nia sulko estu nia, kvankam eta hodiaŭ, jam pli granda morgaŭ ; sed hodiaŭ kaj morgaŭ ĉiam libera de lolo !

L. H., Hispanujo.

KAPITALO.

S-ro John Hoyle certe klarigis kapitalon en sia letero presita en n-ro 13, sed li ne klarigis kapitalistojn. Lenin diferencigis inter produktadaj kapitalistoj kaj financaj kapitalistoj. La produktadaj kapitalistoj produktas ĉion kion la homaro bezonas : nutron, varmon, ŝirmon kaj lukson. La financaj kapitalistoj manipulas monon kaj krediton, kaj produktas ŝuldon. La produktadaj kapitalistoj forigas malsufiĉecon, sed la financaj kapitalistoj *okazigas* malsufiĉecon. Senŝuldigo estas la espero de ĉiuj saĝaj. Memorigu la saĝecon de Lenin. Diferencigu inter la produktistoj de varoj kaj la produktistoj de ŝuldoj. Socikredito forigos ŝuldon. Socikredito savos la mondon.

WILFRED TOWNEND,
prezidanto de TASK.

AMIKAJ KLUBOJ POR GERMANUJO.

Mi turnas min al la esperantistaro tutmonda. Kiu volas helpi al gesamideanoj en Germanujo ? Al ili mankas preskaŭ ĉio. Ili ne havas sufiĉe da lernolibroj, vortaroj aŭ Esperanto-gazetoj. Tamen la Esperanto-movado rapide kreskas en Germanujo, speciale la junular-movado ; pri tio mi havas bonan sciigon, ĉar mi partoprenis la germanan Esperanto-kongreson en Munkeno kaj poste la junular-tendaron en la germanaj Alpoj, kie mi travivis kvin tre interesajn kaj neforgeseblajn tagojn kune kun germanaj geesperantistoj. Ili volonte korespondas kun eksterlandanoj ; sed estas tre malfacile por ili ricevi adresojn, ĉar ili preskaŭ ne havas eksterlandajn Esperanto-gazetojn. Ofte kiam ili skribas, ili ne ricevas respondon. Tiel ili kompreneble perdas la energion kaj plezuron por disvastigi Esperanton.

Por montri al ili, ke la eksterlandaj esperantistoj ne forgesis kaj eĉ volonte helpos ilin, mi pripensis starigi amikajn klubojn por Germanujo. Por esti amika klubo, ni devas aboni minimume unu Esperanto-gazeton por la germana klubo kaj skribi leteron al ĝi monate. Por kontroli, ke unu klubo ne havos multajn amikajn klubojn eksterlande kaj aliaj kluboj eble havos neniun, mi petas vin sendi al mi liston de kluboj kiujn vi deziras havi kiel amikajn klubojn. Supre sur la listo vi skribu tiun klubon kiun vi plej volonte deziras. La celo estas atingi ke ĉiu germana Esperanto-klubo havu amikan klubon eksterlande. Tial anoncu vin multnombre ! Antaŭe dankas por respondkuponoj, poŝtkartoj kaj bele afrankitaj leteroj : Georg Lisbjerg, Udsigten 23, Kolding, Danujo.

G. L.

Mia amiko en Svisujo.

Jes, mia amiko vere bonfartas. Dum longa tempo jam li loĝas en Svisujo. Bonan pozicion li havas kaj bonegan salajron. Konatoj de li diras : Jes, *tiu* estis bonŝanca, *tiu* havis feliĉon !

Mi konas la vivovojon de mia amiko. Apenaŭ li estis forlasinta la lernejon, li jam havis altencelantajn, ambiciajn planojn. Mi ofte ridetis interne pri liaj junulecaj revoj.

Dum tiu tempo nia amikeco preskaŭ ekdormis, ĉar neniam li havis tempon por mi. Kelkfoje mi vizitis lin, sed li tute nekaŝe klarigis al mi, ke mia vizito estas nekonvena. Li ĝentile atentigis min pri la fakto, ke li devas studi kaj labori.

Jen, je iu tago mi fakte miris unuamomente : mia amiko vizitis min ! « Mi venas al vi por adiaŭi, ĉar mi akceptis postenon en Svisujo, » li diris. « Se mi havos tempon, mi skribos al vi, » estis liaj lastaj vortoj.

Post multaj semajnoj mi ricevis bildkarton el Bern, poste ankoraŭ mallongan leteron.

Jaroj pasis.

Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis vivosignon, eĉ agrablan, de mia preskaŭ forgesita amiko. Per mallonga letero li demandis min, ĉu mi ŝatus pasigi mian ĉijaran libertempon ĉe li en Svisujo.

Mi tre ĝojis pri tiu invito kaj danke akceptis. Kvar feliĉajn semajnojn mi ĝuis en la eŭropa paradizo. Nun mia amiko havis tempon. Dum tiuj belegaj tagoj reviviĝis nia knabtempa amikeco. Tre detale li rakontis al mi pri sia vojo al la « feliĉo ». Senĉesa studado, diligenta kaj penplena laboro, rezigno je preskaŭ ĉiuj ĝuoj kaj plezuroj, kuraĝo, kaj kontentiĝo je kreado kaj verkado, — jen estas la ĉefaj iloj kaj ecoj, per kiuj li forĝis sian feliĉon. Aro da nenombreblaj ŝvitogutoj brilas sur la vojo de li trairita.

Ja, *tiu* havis feliĉon ! diras liaj konatoj. Tamen mi ne kredas, ke multaj el liaj nunaj enviantoj ŝatus iri laŭ la sama dornoriĉa vojo.

FRIEDRICH HAHN.

Logiko.

« Esperanto estas genia elpensaĵo, » diris la profesoro, kaj li elpensis novan mondhelplingvon.

*

« En la mondon venis nova sento, » pensis la malobeema knabo, kiam li unuafoje sentis la bastonon de la patro sur sia postaĵo.

*

« Vivu la homaranismo ! » ekkriis la fidela Zamenhofano, kaj li lasis nerespondita la korespondpeton de la germano.

*

« Azeno estas inteligenta besto, » deklamis la Cseh-instruisto, kaj li donis vangfrapon al la kursano lin nominta tiel.

*

« La Biblio malpravas, asertante ke Adamo estis la unua homo, » konstatis Teĉjo, kaj li montris al firmtabulo, sur kiu estis legeble : « Adam, pli frue Kohn. »

*

« Vivo estas agrabla, » opiniis la fervora prizorganto de la Libroservo, kaj li metis la enspezojn en la propran poŝon.

*

« La kongresvojaĝo estis multekosta, » diris la karavan-gvidanto, kaj li malabonis Heroldon.

(tj)

MIKSPOTO.

Esperanto mortis ! kategorie deklaris la redaktoro de irlanda gazeto « Comhar ». Evidente tion pruvis la 2400 esperantistoj kunvenintaj en München, la 1800 kongresanoj en Malmö kaj la 1500 en Amsterdam.

La Verda Frato. D-ro Lohmeyer en Bückeburg (Germ.) finverkis komedion « La verda frato, aŭ : La famaj tri vortoj », — en kvin lingvoj, sed la komedio estas tiel konstruita ke Esperanto ĉiam denove malkomplikas la gajigan nodon de l' miskomprenoj. (Detaloj en iu sekvonta numero.)

Sportmanio. Multaj sudamerikanoj estas entuziasmaj por la piedpilka sporto. Foje ili eĉ forlasas por kelkaj horoj revolucion, por vidi ludon de sia nacia piedpilkistaro.

Kio estas politikisto ? Usona samideano Jomoco asertas, en skribaĵo al ni, ke « politikisto estas ulo kiu povas sidadi sur barilo kaj tenadi la du orelojn al la tero ».

Formikaj kruroj. « Se ni povus movi niajn krurojn tiel rapide kiel la formikoj, » deklaris zoologo, « ni povus kuri 1500 kilometrojn en unu horo. » — « Ha, kial mi ne havas formikkrurojn ! » sopiris la bankkasisto, kiam li ĵus ricevis de iu kliento cent biletojn de po mil dolaroj.

Faktermino. Fotografo promenis kun sia fileto en la urbo, kiam preteriris negro. — « Paĉjo, » diris la knabo, « rigardu ! Tie iras negativo ! » (Laŭ « Nia Organo. »)

RIDO SANIGAS

AŬDI KAJ VIDI.

En lando montara (pri kies nomo mi ĝentile silentas), en vilaĝoj iom flanke de la grandaj vojoj, la moroj ankoraŭ estas primitivaj kvazaŭ pratempaj. Kiam la individuaj pasioj kunpuŝiĝas, la rajto de l' pugno ofte ekregas, precipe dimanĉe en la drinkejoj, kie ofte oni sin reciproke pugobatas, kaj kie bastonoj, seĝoj, eĉ la tranĉilo, ŝajnas taŭgaj iloj por konvinki kontraŭulojn pri la praveco de l' propra opinio.

Post tia interbatado foje la juĝisto penis klarigi la faktojn. Inter la vokitaj atestantoj estis la kampulo Huber, kiu singardeme kaj hezitante respondas la demandojn kaj cetere evidente klopodas, senkulpigi siajn amikojn, kulpigante la aliajn La juĝisto sekve estas malkontenta pri liaj eldiroj.

« Atestanto Huber, ĉu malgraŭ la mallumo vi vidis, ke la kulpigito batis la vunditan Moser per seĝa piedo ? » — « Mi ... ĝin ... aŭdis ! » — « Aŭdis, aŭdis ..., » diras malŝate la juĝisto, « tio pruvas nenion. Vi do ne vidis ĝin. Foriru ! »

Huber estas furioza. Elirante li aŭdigas tonon tre maldecan.

La juĝisto indignas, li krias : « Revenu ĉi tien, Huber ! Mi arestigos vin pro maldeca konduto ! » — « Pro kio ? » demandas hipokrite la ruza kampulo. — « Pro kio ? Kia demando ! Pro via impertinenta maldeco. » — « Ĉu vi vidis tion, sinjor' juĝisto ? » — « Mi ja aŭdis ĝin. » — « Ha, aŭdis, aŭdis ..., » imitas la kampulo, « tio ja pruvas nenion antaŭ la juĝisto. Oni devas esti vidinta ! »

JOS. SOMMER.

La Alfabeto.

A estas la Atomo.
Se liberiĝos ĝi,
Ceterajn la literojn
Ne plu bezonos ni.

(« Nia Organo. »)

Esperanta Radio-Kalendaro.

La horindikoj estas laŭ normala GMT (Tempo de la Meridiano de Greenwich). En landoj kun normala mezeŭropa tempo (ekz. Nederlando) oni aldonu unu horon.

Ni ne povas garantii pri la korekteco de la hor-indikoj ; eventuale ni petas ĝustigon.

Ĉiutage :
16.30-16.45 Praha 1935 kaj 31,41 m. Bulteno kaj muziko.
17.15-17.30 Paris 41,21 m. Esp.-programo.
22.00-22.15 Praha 49,92 m. Komento kaj informa bulteno aŭ radio-muntaĵo.

Dimanĉe :
5.00, 7.00, 9.00, 11.00 Radio-Esperanto (nigra stacio) 5 m.

Lunde :
21.50-22.00 Praha 470 m.
22.00-22.30 Verda Stacio Praha 220, 259, 270 kaj 325 m. (Nur la unuan lundon en la monato.)
23.30-23.35 Budapest 549,5 m. Sciigoj.

Marde :
17.55-18.00 Schwarzenburg (Bern) 25,61 kaj 48,66 m. Pri Svislando. (D-ro Baur.)
18.50-19.00 Sofia 32,9 m.
20.45-21.00 Hr. Kralové 238 m. (Ne elsendas la unuan mardon en la monato.)
20.50-21.00 Ostrava 259 m. (Ne elsendas la unuan mardon en la monato.)

Merkrede :
5.45-6.00 (?) München 48,70 kaj 405 m. Esperanto-kurso. Ĉiun duan merkredon : la 20.10., 3.11., 17.11 ktp.
10.15-10.35 Paris 431.5 m. Kurso.
20.10-20.25 Warszawa 48,25 m.
23.30-23.35 Budapest 549,5 m. Sciigoj.

Jaŭde :
17.45-17.50 Wien 31, 41 kaj 228,6 m. Informoj pri Esperanto ; tuj poste :
17.50-18.00 (samaj ondoj). Esperantlingvaj informoj pri Aŭstrio.
17.55-18.00 Schwarzenburg (Bern) 25,61 kaj 48,66 m. Pri federalismo kaj paco (Prof. D-ro Privat.)
21.50-22.00 Praha 470 m.
20.50-21.00 Ostrava 259 m.

Vendrede :
18.50-19.00 Sofia 32,9 m.
23.30-23.35 Budapest 549,5 m. Sciigoj.

Sabate :
13.00-13.15 München 48,70 kaj 405 m. Esperanto-kurso. (Ĉiun duan sabaton : la 25.9., 9.10., 23.10. ktp.

*

Aŭskultantoj ne forgesu skribi al la koncernaj radiostacioj, dankante kaj instigante :

RAVAG, Argentinierstr., Wien IV, Aŭstrio.
Radio Sofia, Bulgarujo.
Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII, Ĉsl.
Radiostacio, Brâfova 5, Ostrava, Ĉsl.
Radiostacio, Vychodočesky Vysilač, Hradec Krâlové, Ĉsl.
Radiodiffusion Française, Émissions Espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
Radio München, Kulturabteilung, Rundfunkplatz 1, München, Germanujo.
Hungara Radio, Budapest, Hungarujo.
N.C.R.V., Afd. Omroep, Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
V.A.R.A., Radio-Omroep, Hilversum.
Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa.
Schweizer Kurzwellendienst, Bern, Svis.

Esperanto en la gazetaro.

France-Monde (majo-junio), la oficiala revuo de la Liona Foiro, enhavis dulingvan artikoleton pri la ŝanĝo de la asocio « Esperanto kaj Komerco » je « Esperantista Komerca Ĉambro ».

Ce que fut la Foire de Lyon 1948. Eldonaĵo en formo de revuo. Kun artikolo « Esperanto et Commerce ». (Informo pri Esp.-giĉetoj ĉe *ĉiu* poŝtoficejo en Nederlando ne estas korekta.)

La Liberté, 25.5., Le Progrès, 14.5. kaj 3.6., *Lyon Libre,* 24.5., enhavas artikolojn pri ekspozicio de infanaj desegnaĵoj kolektitaj per Esperanto.

La Bourse Egyptienne, Cairo, 25.5. Pri Esperanto kaj Esperanto-kongresoj.

La Patrie, Cairo, 26.5. Pri Esperanto kaj Esp.-kongresoj, de T. Megalli.

Revista do Globo, Porto Alegre, Brazilo, 10.7. Ampleksa revuo ilustrita, kun 4-paĝa artikolo de Rubens Vidal « Antaŭ, dum kaj post Zamenhof » kun 7 ilustraĵoj.

Companeros, Montevideo, majo, enhavas esperantlingvan alvokon al infanoj-lernantoj en la tuta mondo.

La Voce di S. Antonio, Roma, aŭg. Kun informoj pri 2-a katolika Esp.-tago.

North Borneo News, Sandakan, Borneo, 1.4. kaj 16.6. La eldonanto en ĉiu numero (dufoje monate) publikigas senpagan reklamon pri Esperanto.

Althydubladid, Reykjavik, Islando, 24.8. Pli ol tutpaĝa artikolo de D-ro A. Mildwurf pri Esperanto.

Allgemeiner Anzeiger, Rheineck, Svis., 7.9. Kun mallongaj sciigoj pri Esperanto el kvin landoj.

Skanska Aftonbladet, Malmö, 31.7., 2. kaj 3.8. (kaj postaj tagoj) kun kongresraportoj kaj mondnovaĵoj en Esp., sub speciala titolo « Esperanto-Gazeto ».

Ons Orgaan, Amsterdam, 21.8. Kun artikolo « Esperanto en la sindikata movado ».

Westfriese Klanken, Hoorn, Ned., 9., 16., 23. kaj 30.7. Ĉiu numero de tiu grandformata semajna ĵurnalo enhavas specialan Esp.-rubrikon.

Bremer Volksstimme, Bremen, 27.8. Kun art. de Fr. Hahn « Mondhelplingvo Esperanto ».

Ne konataj ĵurnaloj. Oni sendis al ni plurajn ĵurnalojn kun sciigoj pri Esperanto, sed sen indiko de la titolo kaj aperloko ; ni do ne povas mencii ilin. Alia samideano sendis al ni eltondaĵojn (Esp.-informojn) el *Nieuwe Haagsche Courant.*

Ni recenzas.

Karel Čapek : Skizoj pri Nederlando. El la ĉeĥa lingvo tradukis G. J. Degenkamp. 95 p., 12 x 19 cm. Libroservo FLE, Amsterdam. Prezo gld. 1.75 (plus 10 % por sendkostoj). Mendebla ĉe Heroldo.

Tre ĉarma verketo, pri kies apero en Esperanto oni povas vere ĝoji. Per malmultaj vortoj, kun bona observemo kaj bonhumoro, Ĉapek trafe priskribas la tipajn interesaĵojn de Nederlando. Propraj desegnoj de la aŭtoro, same trafaj kaj bonhumoraj, ankoraŭ aldonas al la ĉarmo de la libreto. La lingvo estas tre bona. Malmultaj preseraroj, inter ili unu stranga sur p. 40, lin. 7. Ĉu *latvoj,* perdinte sian sendependecon, fariĝis jam tiel malmulte konataj, ke hodiaŭ oni povas nomi ilin en nia lingvo « letonoj » (p. 83-85) ? T. J.

Du reeldonoj de facilaj rakontoj. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhöj, eldonis en dua eldono de *Adi : La Forto de l' Vero* (prezo 3 dan. kronoj). Ke ĝi povis eliri tiel rapide post la unua eldono, estas evidenta pruvo por ĝia ŝatateco kiel facila romano por komencantoj. La titolpaĝo ricevis novan, pli trafan desegnon. — « La Nederlandaj Geamikoj de la aŭtoro, Rotterdam » reeldonis alian facilan romaneton, nome tiun de nia fama verkisto *Julio Baghy : La Verda Koro* (prezo ne montrita), nun sen ilustraĵoj. — Ambaŭ libroj estas tre bone presitaj, kaj ambaŭ estas nepre rekomendindaj.

Ludovic Rodo : Vivo de Pissarro. 28 p., 12,5 x 18 cm. Kun 10 ilustraĵoj. Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa 49-I, Porto, Portugalujo. — Ĉi tiu skizo pri la vivo kaj verko de l' fama impresionista pentristo Camille Pissarro estas originale verkita en Esperanto. Jen denove biografio de genia homo kiu preskaŭ dum sia tuta vivo devis batali kontraŭ la nekomprenemo kaj antaŭjuĝoj de siaj samtempuloj. Rekomendinda broŝuro. M.

Hugo Kraus : Ĉu militoj estas eviteblaj ? Artikolo en formo de 10-paĝa broŝureto. Eldonis Aŭstria Laborista Esperantistaro, Neutorgasse 9, Wien I. Prezo ne montrita. — La aŭtoro, post kelkaj ĝeneralaj konsideradoj, venas al la konkludo ke militoj estas eviteblaj, per starigo de socialismo kaj enkonduko de Esperanto. Li opinias — kaj la plimulto de l' esperantistoj konsentos — ke « militoj estas fenomenoj de *efemera* barbara epoko de la evoluo de l' homaro ». M.

Sur la verda vojo : Kantu. Prezo 80 fr. fk., ĉe Nordfranca Federacio, Esperanto, Arras (P.-d.-C.), Francujo. — Broŝureto (10,5 x 13,5 cm) kun 74 kantoj, plejparte tradukitaj el la franca, kelkaj el la germana, nederlanda, afrikana, angla kaj itala. Speciale interesis nin, trovi en la libreto tradukon de Lidja Zamenhof « La krokodilo ».

Parolspuro estas la titolo de du folioj, eldonitaj de Esplora Rondo por la Parolspuro, Herbert Köhrmann, Kaiserstr. 19, (22a) Wuppertal-Vohwinkel, Germanujo. — « Parolspuro » estas iom ŝanĝita formo de Intersteno, « la unua kaj ununura figurado laŭnatura de lingvoj kaj idiomoj » de F. de Kunovski. Ŝanĝitaj estas precipe la signoj por h, n kaj ŝ. Ĉu bone por la praktika uzado ? Tion oni devos demandi al la uzantoj.

Esperanto parolata. Emajlita ŝildeto kun verda stelo kaj la vortoj « Esperanto parolata », formato ĉ. 6 x 12,5 cm. Prezo gld. 0.65 ĉe Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.

Afiŝegon (100 x 70 cm) kun stelo kaj teksto « Welthilfssprache Esperanto — Neuer Lehrkurs demnächst — Anmeldung und Auskünfte : Esperanto-Gruppe Luzern » eldonis Esp.-grupo Luzern (Svislando).

Glumarkoj (ĉ. 3 x 3,5 cm) : 1. kun bildo de Zamenhof kaj araba teksto ; 2. kun bildo de piramidoj kaj sfinkso, teksto araba kaj Esperanta. Prezo de 100 markoj 3 resp.-kup., ĉe la eldoninto D-ro T. Megalli, P.B. 1914, Kairo, Egiptujo.

Prof. Dr. Karl Vossler : Volkssprachen und Weltsprachen. 25-paĝa broŝuro, aperinta en serio « Geistiges München », Drei Fichten-Verlag, R. von Fichte, München.

En ĉi tiu verketo la konata profesoro por romanaj lingvoj montras sin granda simpatianto por nia afero, kvankam li restas iom dubema. Je la fino li sugestas ke venu sincere vera poeto de popol-interfratigo kaj de libera, « de kor' al koro pulsanta » mondtrafiko, kaj ke li verku en lingvo ne-nacia, vere neŭtrale-homara. « Kaj kial (li demandas) ĉi tiu lingvo ne estu Esperanto ? Patrinlingvo ĝi ne estos, sed jes fratlingvo: »

Paul Mitrovich : Projekte de un inter-sistemal gramatike de auksilar lingves. Izdanje Pisca, Sarajevo 1947, Jugosl. — 23 p., 15 x 22,5 cm. — En antaŭparolo (en lingvoj franca, angla, germana kaj hispana) la aŭtoro diras ke la tempoj, kiam oni ellaboris novajn artlingvojn, ŝajne forpasis ke persistis kvin helplingvoj (Esperanto, Ido, Latino sine flexione, Occidental kaj Novial) kaj ke oni nun povas provi, el ĉi tiuj kvin krei idealan helplingvon. Al tio estas dirende ke, el la « persistintaj » helplingvoj, Ido preskaŭ formortis, Latino kaj Novial neniam trovis konsiderindajn anarojn, kaj ankaŭ Occidental, kompare kun Esperanto, restis malmulte disvastigita. La plej utila maniero de kunlaboro estus, en la praktiko nuntempe propagandi nur Esperanton, kaj en la teorio komune serĉi la idealan mondhelplingvon de l' estonteco. Jen citaĵo de Zamenhof tradukita en la nova projekto : If mi ne kreded firme ke li Nov Religie (Socializm) vad vikt, mi nekvand vud publikat li lingve (Esperanto), kvi es solo un medium, ma ne un objektive.

ANONCETOJ

Edziĝo ter Braake-Staritsky. La 15.9. geedziĝis ges-anoj W. ter Braake kaj V. Staritsky, *Haarlem,* Nederlando. — Koran gratulon !

Letervespero-Ekspozicio je 15 decembro. Nepra respondo. Sendu leterojn, kartojn kaj ekspoziciaĵojn por nia vigla grupo ! S. Kövesdi, *Tokodaltaro,* Hungarujo.

La esperantistaro de Berlin aranĝos en kunlaboro kun la Popola Altlernejo altnivelan Zamenhof-solenon en venonta decembro. En- kaj eksterlandaj grupoj kaj unuopuloj bonvolu skribi salutkartojn al : Bürgermeister (= urbestro) Timm, Rathaus, *Berlin-Neukölln,* Germanujo.

Materialon por migranta ekspozicio ni ege bezonas. Sendu broŝurojn, kartojn, gazetojn kaj ĉion, kio taŭgas. Rekompence vi ricevos belan broŝuron pri Danlando. Centra Dana Esperantista Ligo, St. Blichersvej 43, *Aabyhöj,* Danlando.

Kiu scias la adreson de s-ano Luigi Canz (el Udine aŭ Trieste) ? Se li ankoraŭ vivas, bonvolu sciigi al mi kontraŭ reciproka komplezo. Zibert Franjo, raĉunovodja, *Trbovljerudnik,* Jugoslavujo.

Esperantajn librojn interŝanĝas tutmonde Esperanto-klubo, sekretario Z. Rezaĉ, *Tanvald 456,* Ĉeĥoslovakio. Proponu kaj indiku prezon ! Respondo certa.

Tutmonda Katolika Adresaro, 1949, Kvara Jaro. Enskribo de nomo, adreso, aĝo, telefono, koresponddeziroj : du internaciaj respond-kuponoj (kun senpaga ekzemplero de la Adresaro). Limdato : 15 decembro. Aperos : 1 Januaro. — Lorcan O'hUiginn, Bothar Glasard 16, *Dublin,* Irlando. (84)

Brazila Ligo Esperantista sendas unu ekzempleron de la belega albumo de S. Paulo (recenzo en Heroldo n-ro 12) al ĉiu esperantisto, kiu ĝin petas, aldonante al la letero dek respond-kuponojn. Adreso : Praça da Republica 54, *Rio de Janeiro.*

De Belga Esperantista Turista Servo, s-ano Robert Loeckx, Konijnenperken 109, *Boschvoorde-Brussel,* Belgujo, petu (kontraŭ unu resp.-kupono) : 1. turismajn broŝurojn kun vidindaĵoj, planoj ktp. pri belgaj urboj (senpage) ; 2. loĝejon en esp. hoteloj aŭ ĉe samideanoj (kontraŭ pago) ; 3. reciprokan gastigadon ; 4. gvidadon pere de samideanoj.

Jozefo Scalenghe en Torino (Italio), pro malsano ne povante respondi al ĉiuj, kiuj skribis al li, petas pardonon, dankas kaj salutas.

Sendu 100-400 poŝtmarkojn al mi, kaj mi samkvante sendos britajn al vi. R. A. Newland, 270 Whippendell Road, *Watford,* Herts., Anglujo.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj kaj muziko s-ro B. van Damme, C 82, *Baarland (Zld.),* Nederlando. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.

16-jara lernantino deziras korespondi tutmonde. Kolektas poŝtkartojn ilustritajn. Johanne Dahl, « Torpegaard », *Taps pr. Kolding,* Danlando.

Juna kursgvidanto, profesia librovendisto, serĉas gejunulojn en la tuta mondo por konstante korespondi pri ĉiuj temoj kaj amikiĝi. Mi ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn. Helmut Müller, Schulstr. 19, *(10b) Neu-Oelsnitz,* rusa zono, Germanujo.

Bibliofiloj, kolektantoj kaj bibliotekistoj atentu ! Ni deziras aĉeti (pagos bonan prezon) de *La Revuo* n-ron 10 de 1914, *Universo* la trian jarkolekton 1911-1912, *Esperanto (UEA)* jan., marto-junio 1919, aŭ la kompletan jarkolekton, kaj majo 1920. — Ni deziras vendi de *Esperanto* (UEA) jarkolektojn 1921 (bele bind.), 1928-1934, 1935 (sen marto kaj nov.), *Of. Gazeto Esperantista* 1913 kaj 1914, *Espero Katolika* 1926 (la sept. n-ro ne aperis), 1929 (sen n-ro 68), 1930, *International Language* 1929 (sen febr.), 1930, *British Esperantist* 1932, *Itala Esp.-Revuo* 1923, 1924, *France-Esperanto* 1923, *Holanda Esperantisto* 1930 (sen n-ro 116) kaj *Literatura Mondo* febr.-julio kaj okt. 1934. — Faru ofertojn al *Flandra Esperanto-Instituto,* P. van Humbeekstr. 3, *Brussel-West,* Belgujo.

Korespondi pri fervojoj, interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun la tuta mondo, precipe orienteŭropaj landoj, deziras Suchy Frantiŝek, 27-jara fervojisto, *Mesto Zdar 456,* Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj, volonte per poŝtkartoj ilustritaj. Certa respondo. Bruno C. Brink, *Skodborg J,* Danlando.

Subskribinto, suferanta pro malvastiĝinta ezofago, devigata sin nutri artefarite, afable sed insiste petas informojn pri eblecoj por rebonigi tian malsanon. Jan Toorneman, Diepenveenseweg 169, *Deventer,* Nederlando.

Imponan letervesperon intencas aranĝi Bremenaj esperantistoj dum novembro. Bonvolu adresi leterojn kaj poŝtkartojn al Gerhard Ziegler, stud. jur., Stolberger Str. 13, *(23) Bremen,* US-Enklavo, Germanujo.

23-jara hungara junulo deziras amikan korespondadon en la tuta mondo. Kolektas bildkartojn. Stefano Temessy, Garbai Sandor ucca 20, *Miskolc-Csaba,* Hungarujo.

6 komencantoj, inter kiuj unu 10-jara, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj. Skribu al Lad. Mlejnek, sekretario, Chrastava 442, u *Liberce,* Ĉeĥoslovakio. Respondo certigita.

Sendu al mi 50-100 malsamajn poŝtmarkojn de via lando, kaj interŝanĝe mi tuj sendos en bele afrankita letero la saman nombron da svedaj poŝtmarkoj. Nur bone purigitaj kaj nedifektitaj poŝtmarkoj estos akceptataj. S-ro Arne Pettersson, Storgatan 8, *Oskarshamn,* Svedujo.

F-ino Vautes (nederlandanino), Hilfskrankenhaus, Auf dem Hohen Ufer, *(23) Bremen-Grohn,* US-Enklavo, Germanujo, kiu devas resti kelkajn monatojn en malsanulejo, deziras ekkorespondi eksterlanden.

Ĉu vi jam posedas la libron

Tra densa mallumo?

Se ne, nun akiru ĝin !
Enhavas interesajn artikolojn, speciale ni mencias

Esperantologio

de D-ro P. Neergaard, Kopenhago.

Prezo 2.50 d.kr.

Akirebla ĉe Libro-Servo de D.L.E.A., N. P. Skyum, Sonnesgade 8, *Aarhus,* Danlando.

Filatelistoj atentu!

Fredericia Esperanto-klubo (Danlando) intencas eldoni adreslibron pri kiel eble plej multaj esperantistaj filatelistoj en ĉiuj landoj, por ke ili senpere povu interkonatiĝi.

Ni insiste petas ĉiujn esperantistojn, kiuj kolektas poŝtmarkojn, sendi poŝtkarton aŭ leteron kun nomo kaj adreso al la kluba vicprezidanto, *Alfred Christensen, 6. Julivej 45, Fredericia, Danlando.* Afranku filatele ! (83)

Letervespero okazos fine de oktobro. Ĉiu, kiu sendos poŝtkarton aŭ salutleteron, ricevos belan poŝtkarton. Skribu al : S-ro Gersy, instruisto en *Contres* (Loir-et-Cher), Francio.

La ino kun la antaŭnomo ANNIE, kiu korespondis antaŭ la milito kun la norvega esperantisto Ragnvald Berg kaj ankaŭ renkontis lin en Nederlando, bv. kontakti kun s-ro A. Schouten, Bogen 40, *Gouda,* Nederl.

Ni donos premiojn de libroj kaj gazetabonoj al ĉiu, kiu konigos nian programon al ĥoro aŭ danctrupo. Apartaj premioj por belaj kaj gravaj salutoj. Petu detalojn kaj programon de : III-a Internacia Muzikfesto, Junio 1949, sekretariino, Ponciau, *Wrexham,* Britujo. (86)

Esperantista Teatro estas fondita en Germanujo. Interesuloj, amikoj de l' arto, bonvolu skribi al : Profesoro A. Steynhardt, Viktoriastr. 39 d, *Lünen* (Westf.), Germ.

Filatelistoj ! Ni deziras interŝanĝi poŝtmarkojn el ĉiuj landoj, krom Germanio. Nur seriozaj samideanoj bonvolu skribi al : Jozefo Motliĉek, *Drahotuše* (Moravio), Ĉeĥoslovakio.

Mi intencas starigi lokan grupon kaj aranĝi kurson. Sendu varbmaterialon el la tuta mondo ! Mi nepre respondigos laŭvice. C. Kessler, Kurze Str. 4, *(10a) Klotzsche,* Germanlando.

Fine de oktobro filatelista kaj esperantista asocioj de francaj fervojistoj organizos en Parizo komunan ekspozicion. Tiuokaze estas eldonota memoriga poŝtkarto, kaj speciala poŝtejo funkcios dum la ekspozicio. Kiu deziras ricevi tiun karton, filatele afrankitan kaj stampitan per speciala dat-stampilo, sendu 2 resp.-kup. al s-ro Pierre Poly, 2 Square Louis Gentil, *Paris 12,* Francujo. (Por ĝin ricevi sub koverto, sendu 3 resp.-kup.)

Elisabeta Kiss (Nagytétény, Pest m., Hungario), malsana instruistino, esprimas ĉi-okaze sian varmegan dankon pro la granda ĝojo kaj konsolo, kiun kaŭzis al ŝi eksterlandaj gesamideanoj per multaj leteroj kaj salutkartoj. Ŝi sendas dankeman manpremon al ĉiuj, kiuj ĝojigis ŝian vivon per vera bonvolo kaj homano.

La interesan biografiaron KIU ESTAS KIU (kun biografietoj kaj adresoj de 400 nord-amerikaj gesamideanoj) vi povas ricevi por unu guldeno (anstataŭ unu dolaro) ĉe la Libroservo de Heroldo. Plej nova eldono, 1947-1948.

Parolspuro de Kunovski la unua skribo por ĉiuj. Instruistoj informiĝu ĉe Esplora Rondo por Parolspuro, Kaiserstr. 19, *(22a) Wuppertal-V.,* Germanujo. (74)

Nederlandanoj ! Ankaŭ en Hago vi povas fari Esperanto-ekzamenon. Kostoj : nur gld. 3.75. Petu detalan, senpagan prospekton. Sekretario : Haga Esperanto-Ekzamena Komitato, Halleystr. 11, *Hago,* Nederlando. (75)

Esperantistoj kaj ne-esperantistoj ĉiulandaj deziras interŝanĝi poŝtmarkojn ktp. kaj korespondi. Postulu Presaĵon A, aldonante respondkuponon kaj adresitan koverton, de « Peranto Esperanto », *(13a) Ansbach/Mittelfranken,* Germanujo. (76)

Vizitu la Rejnan Esperanto-Hotelon en Bad Godesberg apud Rejno, ĉe la fervojo Kolonjo-Koblenco ! Skribu al Kasper Groos, Meckenheimerstrasse, *(22c) Bad Godesberg,* brita zono, Germanujo. (77)

F-ino Maŭrja Ferrejra da Roza, Rua Osvaldo Cruz 409, *Santos (S.P.),* Brazilo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj. (78)

Ĉu vi deziras internacian korespondadon ? Ĉu interŝanĝadon de poŝtmarkoj aŭ aliaj kolektaĵoj ? Ĉu vi volas aĉeti aŭ vendi komercaĵojn eksterlande ? Por informoj vin turnu al : I.K.S., 101 Z.W. Buitensingel, *Hago,* Nederlando. (79)

Kolektantoj ! Alsendu 3 aŭ 6 resp.-kuponojn aŭ Esp.-libron ! Mi sendos valorajn Esp.-kongresajn stampojn aŭ sigelmarkojn ktp. Leo Funken, Villenpromenade 5, *(22b) Bad Ems,* Germanujo. (80)

Belgajn fotofilmojn (6 x 9, almenaŭ 32° Sch.) — kiu sendos al mi, ricevos de mi Esp.-librojn eldonitajn en Ĉeĥoslovakio laŭ lia deziro. Jiri Hromada, Socharska 2, *Praha XIX/14,* Ĉeĥoslovakio (82)

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, *Loonopzand,* Nederlando. (85)